

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

DE LA LINGVO
ESPERANTO

L. L. ZAMENHOF

17a ELDONO

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

DE LA LINGVO

ESPERANTO

DE

D-ro L. L. ZAMENHOF

17a ~~EL~~DONO

1954

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED
RICKMANSWORTH, ANGLUJO

ENKONDUKO

AL LA NUNA ELDONO

Kun profunda emocio mi skribas tiujn ĉi enkondukajn vortojn.

Post multaj jaroj, dank' al iniciato de la Esperanto Publishing Company, la verkoj de nia kara Majstro, jam elĉerpitaj, kiuj tiamaniere estis preskaŭ perditaj por la vasta esperantistaro, denove aperas ĉe en pli bela formo. Ili sendube fariĝos freŝa torento en nia movado.

Pri tiu okazo, mi kun kortuŝo rememoras la malfacilaĵojn, kiujn devis venki la Majstro antaŭ pli ol sesdek jaroj, eldonante siajn unuajn verkojn. Li devis lukti kontraŭ la malhelpo de la registaro, la indiferenteco de la publiko, fine kontraŭ sia persona financa malbonstato. Li multe suferis, multe batalis, tamen lia neŝancebla kredo en la justeco de la afero, lia profunda amo al sia verko superis ĉiujn malhelpojn, kaj la unua libro aperis en 1887, kiel tre modesta broŝureto.

Ĝi estis legata de malgranda aro da amikoj, pioniroj de la nova ideo, kaj fariĝis fundamento de la vasta esperanta literaturo, kiu tra jardekoj konstante pligrandiĝis.

Malfacila estis la vojo de la esperanta libro; tamen la plej terura sorto frapis ĝin dum la dua tutmonda milito, kiam, je ordono de Hitler, miloj da esperantaj libroj estis bruligitaj en ĉiuj landoj. La fajro bruligis la librojn, sed ne povis entute detrui ilin; kaj nun ni estas atestantoj de ilia reviviĝo.

Mi ĝojas, ke E.P.C. havis la belan ideon denove eldoni tiel valorajn por ĉiu Esperantisto verkojn de la Majstro, kaj deziras elkore, ke la *Fundamenta Krestomatio* fariĝu la unua ĉenero en longa vico de aliaj libroj.

WANDA ZAMENHOF.

En Majo 1954.

ANTAŬPAROLO

AL LA UNUA ELDONO

Prezentante pure kondiĉan rimedon de reciproka komunik-igado, la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene *egale*; kaj por ke ĉiuj povu uzi la lingvon *egale*, estas necese, ke ekzistu iaj *modeloj*, gvidaj por ĉiuj. Tio ĉi¹ estas la kaŭzo, pro kiu, cedante al la peto de multaj esperantistoj, mi eldonis la *Fundamentan Krestomation*, kiu povos servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj.

Lerni la lingvon ĉiu povas laŭ ĉiuj libroj, kiujn li deziras; sed ĉar multaj esperantaj libroj estas verkitaj de personoj, kiuj ankoraŭ ne posedas bone la lingvon Esperanto, kaj komencanta esperantisto ne povus rilati al ili sufiĉe kritike, tial estas, dezirinde, ke ĉiu, antaŭ ol komenci la legadon de la esperanta literaturo, tralegu atente la *Fundamentan Krestomation*. Ne deprenante de la lernanto la eblon kritike proprigi al si ĉiujn riĉigojn kaj regule faritajn perfektigojn, kiujn li trovas en la literaturo, la *Fundamenta Krestomatio* por² ĉiam gardos lin de blinda kaj senkritika alproprigo de stilo *erara*.

Atentan tralegon de la *Fundamenta Krestomatio* mi rekomendas al ĉiu, kiu volas skribi aŭ parole uzi la lingvon Esperanto. *Sed precipe atentan kaj kelkfojan tralegon de tiu ĉi libro mi rekomendas al tiuj, kiuj deziras eldoni verkojn en Esperanto*; ĉar tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon.

¹ En L.R. (p. 62, tria paragrafo) Zamenhof diris, "pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi la ĉi **antaŭ** la montra vorto." Subtene al ĉi tiu konsilo oni atentigas, ke *ĉi* kaj la akompananta montra vorto formas kvazaŭ tutajon, unu son-grupon. Do, se oni diras *tiu ĉi* (=tiu-ĉi), oni rompas la regulon pri la loko de la akcento, ĉar oni akcentas la *ti*—kiu ne estas la antaŭlasta silabo de la songrupo. La formo *ĉi tiu* klare konservas la regulon. Laŭ la konsilo de Zamenhof do oni legu tute tra la *Krestomatio* la formojn *ĉi tio*, *ĉi tiu*, *ĉi tie*, *ĉi tia*.

² Forigu *por*, ĉar la intencita signifo ne estas *eterne*.

Ĉiuj artikoloj en la *Fundamenta Krestomatio* estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ—se ili estas skribitaj de aliaj personoj—ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne flankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas.

L. L. ZAMENHOF,

Aŭtoro de la lingvo *Esperanto*.

Varsovio, en Aprilo 1903.

ANTAŬPAROLO

AL LA KVINA ELDONO

Mi trarigardis denove la tutan Krestomation, kaj mi forigis el ĝi ĉiujn preserarojn, kiujn mi trovis. Dum la trarigardado mi trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe ŝajnis al mi bonaj, sed kiuj nun al mi ne plaĉas kaj kiujn mi volonte ŝanĝus; mi tamen tion ĉi *ne* faris, ĉar mi estas konvinkita, ke por verko, kiu havas la celon subtenadi unuformecon de stilo inter ĉiuj esperantistoj, severa konstanteco estas multe pli grava, ol plena perfekteco, kaj la utilo de la faritaj ŝanĝoj estus multe pli malgranda ol la malutilo, kiun ni ricevus, se mi en ĉiu nova eldono de la Krestomatio volus fari ŝanĝojn laŭ mia plej nova opinio aŭ gusto kaj se ĉiu posedanto de la Krestomatio devus timi, ke nova eldono senvalorigis la malnovan.

Ĉar la Krestomatio enhavas tre grandan kvanton da materialo, kiu estis verkita en diversaj tempoj kaj de diversaj aŭtoroj, tial ne estas mirinde, ke en la libro troviĝas kelkaj vortoj aŭ esprimoj, kiuj ne en ĉiuj lokoj sonas absolute egale (ekzemple: Jesuo¹ kaj Jezo, Kanadujo kaj Kanado, iri returnen kaj returne k. t. p.). Ĉar ne venis ankoraŭ² la tempo, por diri la lastan vorton pri tiuj dubaj formoj, tial mi preferis ne tuŝi tiujn duoblajn formojn, sed rigardi *ambaŭ* formojn kiel egale bonajn kaj uzeblajn laŭ la libera elekto de la uzantoj.

L. L. ZAMENHOF.

Varsovio, en Junio 1907.

¹ La formo *Jesuo* ne troviĝas en la *Krestomatio*; tamen ĝi nun estas la akceptita formo.

² *ankoraŭ ne venis*—laŭ nuntempa stilo.

ANTAŬPAROLO

AL LA 17A ELDONO

La Unua Eldono de *Fundamenta Krestomatio* aperis en 1903. D-ro Zamenhof kompilis ĝin, por ke ĉiuj Esperantistoj havu modelon de stilo. Atentan tralegon de la modelo li rekomendis al ĉiu, kiu volas skribi aŭ parole uzi la lingvon Esperanto; sed precipe atentan kaj plurfojan tralegadon li rekomendis al tiuj, kiuj deziras eldoni verkojn en Esperanto, “ĉar tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon.” Pro la gravegeco de la verko D-ro Zamenhof zorgis, ke ĝi prezentu la stilon, kiun li mem tiutempe uzis.

En 1907 Kvina Eldono de *Fundamenta Krestomatio* aperis, kaj en Antaŭparolo al tiu eldono D-ro Zamenhof diris, ke li trarigardis la Krestomation kaj trovis diversajn esprimojn, kiuj jam ne plaĉas al li, kaj kiujn li volonte ŝanĝus. Tamen li ne ŝanĝis ilin, ĉar li decidis, ke por verko, kiu celas subtenadi unuformecon, severa konstanteco estas multe pli grava ol plena perfekteco.

Sendube lia decido tiutempa estis tute prava, ĉar la lingvo tiam estis ankoraŭ en sia disvolvigema junaĝo; kaj ĉiuj postaj eldonoj de la verko fidele observis la decidon. La 16a Eldono, kiu aperis en 1939, estis preskaŭ identa kun la Unua Eldono.

Dum la dek jaroj, kiuj sekvis la verkadon de la Antaŭparolo al la 5a Eldono, la stilo de D-ro Zamenhof multe pli maturiĝis, ĝis tia grado, ke en 1917, kiam la Majstro mortis, *Fundamenta Krestomatio* jam ĉesis prezenti tute imitindan modelon de la Zamenhofa Esperanto. Kvankam ĝia lingvaĵo ankoraŭ estas belstila kaj plene komprenebla, ĝi en kelkaj rilatoj impresas arkaike. Oni do povas juste supozi, ke, se la Majstro estus povinta vivi pluajn jarojn, li estus kaptinta la unuan okazon fari elfundan revizion de *Fundamenta Krestomatio*, por akordigi ĝian stilon kun la vere matura stilo, kiun li tiam uzis.

Jam de multaj jaroj do spertuloj konstatis, ke la *Fundamenta*

Krestomatio devus aperi en elfunde reviziita eldono, por ke ĝi plue plenumadu sian originalan celon. Je la komenco de 1946 The Esperanto Publishing Company petis S-ro William Bailey, L.K., entrepreni la taskon revizian, kaj li konsentis. La Esperantista mondo scias, ke neniŭ estis pli kompetenta por la laboro, ol li; neniŭ pli detale studis la stilon kaj vortuzadon de la Majstro; neniŭ pli fundamente koniĝis kun la spirito de la lingvo; neniŭ pli ame kaj kompreneme zorgis konservi ĝin. Farinte multon de la laboro, kiu estis tiel simpatia al li, li mortis la 8an de Aŭgusto, 1946.

En tiu bedaŭrinda situacio The Esperanto Publishing Company Limited sin turnis al mi kun peto, ke mi faru tion, kio estas necesa, por fini la laboron. Kvankam mi forte konsciis, ke mia kompetenteco tute ne estas egala al la kompetenteco de S-ro William Bailey en tiu rilato—ankaŭ ke laŭ detala kaj fundamenta koniĝo kun la Zamenhofa lingvo la kompetenteco de kelkaj aliaj gesamideanoj eble superas mian—mi konsentis; aparte pro tio, ke mi havas la feliĉon esti la kuratoro ne nur de la fama Konkordanco, kiun S-ro William Bailey faris de ĉiuj jam eldonitaj verkoj de D-ro Zamenhof, sed ankaŭ de plej multaj el la libroj kaj manuskriptoj de S-ro Bailey. Mi do posedas rimedojn por kontroli, kiujn plejeble ne posedas aliaj kompetentuloj.

Tiel en tiu tempo oni aranĝis la aferon—sed ekestiĝis malhelpaj cirkonstancoj, kaj oni devis rezigni pri la entrepreno ĝis pli favora tempo. Dum la Universala Kongreso en Zagreb 1953 okazis literatura kunveno, en kiu oni kaptis la okazon pridiskuti la projekton. La unuanima opinio de la ĉeestantoj estis, ke la teksto de la *Fundamenta Krestomatio* (kiel ankaŭ de aliaj re-eldonitaj Zamenhofaj verkoj) restu senŝanĝa, sed ke oni indiku per piednotoj la ŝanĝojn, kiujn Zamenhof mem plejeble aprobus. Tiun opinion oni efektivigis en la nuna libro.

La presprovaĵoj estas tre atente kontrolitaj de la eldonistoj, de la Akademiano F. A. F. Faulhaber, kaj de mi. Sekve ni kuraĝas esperi, ke la libro estas tute sen prezeraroj. Mi kaptas la okazon aparte danki al S-ro Faulhaber pro tio, ke li

ankaŭ faris tre utilajn kaj atentindajn komentojn, kiuj multe helpis.

Aperigante ĉi tiun novan eldonon de unu el la plej gravaj verkoj de nia afero, la Eldonintoj volas fari utilegan kaj ŝatindan servon al la kara lingvo mem, kaj ankaŭ al ĉiuj Esperantistoj, kiuj pro amo al la lingvo kaj por danke honori la memoron de ĝia kreinto volas uzi ĝin en maniero, kiu konservos ĝiajn principojn kaj spiriton—en maniero, kiu varme ĝojigus la koron de la Majstro mem, ĉar ĝi ebligas la daŭran disvolviĝon de la lingvo sen ia risiko de pereiga disfalo en diversajn dialektojn.

W. J. DOWNES.

(*Akademiano.*)

En Majo 1954.

Mallongigo uzita

L. R. Lingvaj Respondoj, tria eldono, 1936.

TABELO DE LA ENHAVO

ENKONDUKO AL LA NUNA ELDONO	ix
ANTAŬPAROLO AL LA UNUA ELDONO	xi
ANTAŬPAROLO AL LA KVINA ELDONO	xii
ANTAŬPAROLO AL LA 17A ELDONO	xiii

EKZERCOJ	I
----------	---

FABELOJ KAJ LEGENDOJ

La novaj vestoj de la reĝo	17
Aleksandro Macedona (V. Jabec)	22
Kiu estas la plej bona amiko de la viro?	24
La deveno de la virino	26
La naskiĝo de la tabako (C. Bachiller)	28
Karagara	32
La virineto de maro	33

ANEKDOTOJ	58
-----------	----

RAKONTOJ

Nokto	86
La hejmo de la metiisto	100
La forgesita pipo (A. Edelmann)	109
Arturo	114
La nigra virino	129
La karaj braceletoj	133
Nur unu vorton	136
La porcio da glaciaĵo	144

EL LA VIVO KAJ SCIENCOJ

Bagateloj	169
Fingra kalendaro	197
El la poŝto	202
La loĝejoj de la termitoj	210
Korespondado komerca	215
Kronika katara konjunktivito	217
La sunhorloĝo en Dijon	222

ARTIKOLOJ PRI ESPERANTO

El la unua libro de la lingvo Esperanto	228
Plena gramatiko de Esperanto	239
Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo	241
Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia	253

POEZIO

L. ZAMENHOF

La espero	298
La vojo	299
Al la fratoj	300
Mia penso	302
Ho, mia kor'	303
La vojevodo (Mickiewicz)	303
La rozeto (Goethe)	305
En nord' unu pino (Heine)	306
En sonĝo (Heine)	306
Lorelej' (Heine)	307
Kanto de studentoj	308
Al la reĝo	309
Nokta kanto de soldato (W. Hauff)	310
Kanto de l'ligo (W. A. Mozart)	311
La kapelo (L. Uhland)	311
La gaja migranto	312
La homa vojo (B. N. Delvig)	312

LEO BELMONT

Nokt' en la koro (Byron)	314
Al brusto, al mia (Heine)	314

V. DEVJATNIN

Printempo	315
Ŝipeto	315
Sciuro kaj papago	316
Anĝelo (Lermontov)	316
Husaro (Puŝkin)	317
Infano de zorgo (Herder)	321

Espero (Schiller)	323
Garantio (Schiller)	324
A. DOMBROWSKI	
Mia mizero	328
Nova kanto	329
La malliberulo	330
M. GOLDBERG	
La turo babilona	331
Nova Dio (S. Frug)	333
Cigno, ezoko kaj kankro (Krylov)	339
A. GRABOWSKI	
Tri Budrysoj (Mickiewicz)	340
Revajo (P. Dalman)	341
Excelsior (Longfellow)	342
La pluva tago (Longfellow)	344
La sago kaj la kanto (Longfellow)	344
Sonoriloj de vespero (T. Moore)	345
E. HALLER : Mi rakontis (Vejnberg)	345
G. JANOWSKI : Mi eliras (Lermontov)	346
D. JEGOROV : Aŭtuno	347
F. DE KANALOŜŤY-LEFLER : Kuŝas somero (Heine)	347
A. KOFMAN	
Filino de Iftah	348
La sklavoŝipo (Heine)	353
V. LANGLET : Al la memoro de Józef Wasniewski	357
R. LIBEKS : Latva popola kanto	359
I. LOJKO	
Malgrand'-rusa kanteto	359
Profeto (Lermontov)	360
F. LORENC : Alaŭdeto (Boheme)	361
A. NAUMANN	
Mi amis vin	362
Printempo venos	363

POETETO: La Ĉaso	363
I. SELEZNET: KANTO	364
Ne riproĉu la sorton	364
Revo	365
E. SMETANKA : La poeto (V. Hálek)	366
L. SOKOLOV : La velo (Lermontov)	366
M. SOLOVJEV	
Plendo	367
Tri palmoj (Lermontov)	367
K. SVANBOM : Laŭ sveda melodio	369
S. ŜATUNOVSKI : Ne diru (Nadson)	370
W. WAHER : Spirita ŝipo	370
J. WASNIEWSKI : El la paperujo de miaj fabloj	373
E. DE WAHL : Ĉe l' maro (Heine)	373
F. ZAMENHOF	
Versaĵo sen fino	374
Vizito de la steloj sur la tero	376
O. ZEIDLITZ : Vespero (A. Nikander)	380
L. ZAMENHOF : El Hamleto	383
A. KOFMAN : El Iliado	421

ALDONOJ

Preĝo sub la verda standardo	439
Aldono gramatika	441

Preskaŭ ĉiu verko en la libro aperis unue en la *Unua Libro*, la *Dua Libro*, aŭ la revuoj *La Esperantisto* kaj *Esperantisto* en la jaroj 1889-1895.

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

I EKZERCOJ

§ 1 (Ekzercaro, § 5)

Patro kaj frato. — Leono estas besto. — Rozo estas floro, kaj kolombo estas birdo. — La rozo apartenas al Teodoro. — La suno brilas. — La patro estas sana. — La patro estas tajloro.

§ 2 (Ekzercaro, § 6)

Infano ne estas matura homo. — La infano jam ne ploras. — La ĉielo estas blua. — Kie estas la libro kaj la krajono? — La libro estas sur la tablo kaj la krajono kuŝas sur la fenestro. — Sur la fenestro kuŝas krajono kaj plumo. — Jen estas pomo. — Jen estas la pomo, kiun mi trovis. — Sur la tero kuŝas ŝtono.

§ 3 (Ekzercaro, § 7)

Leono estas forta. — La dentoj de leono estas akraj. — Al leono ne donu la manon. — Mi vidas leonon. — Resti kun leono estas danĝere. — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? — Mi parolas pri leono.

§ 4 (Ekzercaro, § 8)

La patro estas bona. — Jen kuŝas la ĉapelo de la patro. — Diru al la patro, ke mi estas diligenta. — Mi amas la patron. — Venu kune kun la patro. — La filo staras apud la patro. — La mano de Johano estas pura. — Mi konas Johanon. — Ludoviko, donu al mi panon. — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. — Antaŭ la domo staras arbo. — La patro estas en la ĉambro.

§ 5 (Ekzercaro, § 9)

La birdoj flugas. — La kanto de la birdoj estas agrabla. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki. — La knabo forpelis la birdojn. — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la

oreloj. — Bonaj infanoj lernas diligente. — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron. — De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo. — Mi legas libron. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron.

§ 6 (Ekzercaro, § 10)

Papero estas blanka. — Blanka papero kuŝas sur la tablo. — La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo. — Jen estas la kajero de la juna fraŭlino. — La patro donis al mi dolĉan pomon. — Rakontu al mia juna amiko belan historion. — Mi ne amas obstinajn homojn. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! — Bonan matenon! — Ĝojan feston! (mi deziras al vi). — Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ). — Sur la ĉielo staras la bela suno. — En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn. — La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka. — Lakto estas pli nutra, ol vino. — Mi havas pli freŝan panon, ol vi. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia. — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna. — Mi estas tiel forta, kiel vi. — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

§ 7 (Ekzercaro, § 12)

Du homoj povas pli multe fari ol unu. — Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn. — Li promenas kun tri hundoj. — Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj. — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj. — Kvin kaj sep faras dek du. — Dek kaj dek faras dudek. — Kvar kaj dek ok faras dudek du. — Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin. — Mil okcent naŭdek tri. — Li havas dek unu infanojn. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua. — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj. — Kion Dio kreis en la sesa tago? — Kiun daton ni havas hodiaŭ? — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de

Marto. — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.

§ 8 (Ekzercaro, § 14)

Mi havas cent pomojn. — Mi havas centon da pomoj. — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj. — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. — Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron.¹ — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (=tio estas) dek frankojn. — Kvinoble sep estas tridek kvin. — Tri estas duono de ses. — Ok estas kvar kvinonoj de dek. — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj). — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro. — Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope. — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn. — Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj. — Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

§ 9 (Ekzercaro, § 16)

Mi legas. — Ci skribas (anstataŭ “ci” oni uzas ordinare “vi”). — Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino. — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra. — Ni estas homoj. — Vi estas infanoj. — Ili estas rusoj. — Kie estas la knaboj? — Ili estas en la ĝardeno. — Kie estas la knabinoj? — Ili ankaŭ estas en la ĝardeno. — Kie estas la tranĉiloj? — Ili kuŝas sur la tablo. — Mi vokas la knabon, kaj li venas. — Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas. — La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi. — La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi. — Knabo, vi estas neĝentila. — Sinjoro, vi estas neĝentila. — Sinjoroj, vi estas neĝentilaj. — Mia hundo, vi estas tre fidela. — Oni diras, ke la vero ĉiam

¹ *jarmilon.*

venkas. — En la vintro oni hejtas la fornojn. — Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn.

§ 10 (Ekzercaro, § 18)

Li amas min, sed mi lin ne amas. — Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi. — Diru al mi vian nomon. — Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. — Venu al mi hodiaŭ vespere. — Mi rakontos al vi historion. — Ĉu vi diros al mi la veron? — La domo apartenas al li. — Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato. — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn). — Montru al ili vian novan veston. — Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. — Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. — Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian. — Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon.

§ 11 (Ekzercaro, § 20)

Nun mi legas, vi legas kaj li legas; ni ĉiuj legas. — Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas. — Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min. — Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo. — Hieraŭ estis vendredo, kaj post-morgaŭ estos lundo. — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron. — Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos. — Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis. — Se mi estus sana, mi estus feliĉa. — Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi. — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus. — Kial vi ne respondas al mi? Ĉu vi estas surda aŭ muta? — Iru for! — Infano, ne tuŝu la spegulon! — Karaj infanoj,

estu ĉiam honestaj! — Li venu, kaj mi pardonos al li. — Ordonu al li, ke li ne babilu. — Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon. — Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa. — Ŝi volas danci. — Morti pro la patrujo estas agrable. — La infano ne ĉesas petoli.

§ 12 (Ekzercaro, § 22)

Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo, staranta senmove. — Promenante sur la strato, mi falis. — Kiam Nikodemo batas Jozefon, ĉiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato. — Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas. — Trovinte pomon, mi ĝin manĝis. — La falinta homo ne povis sin levi. — Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem pli multe meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto, dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto. — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. — En la lingvo “Esperanto” ni vidas la estontan lingvon helpantan de la tuta mondo. — Aŭgusto estas mia plej amata filo. — Mono havata estas pli grava ol havita. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota. — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj. — Li venis al mi tute ne atendite. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto.

§ 13 (Ekzercaro, § 24)

Nun li diras al mi la veron. — Hieraŭ li diris al mi la veron. — Li ĉiam diradis al mi la veron. — Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron). — Li diros al mi la veron. — Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron). — Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. — Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron). — Kiam mi venos, diru al mi la veron. — Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron). — Mi volas diri al vi la veron. — Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron).